
# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161
Cena – dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. Kultury 47/87-403/16
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 2 Januaro 199 Leden Číslo
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx



FELIĈON, SANON
KAJ VIVKONTENTON EN LA
NOVA JARO 1992
DEZIRAS AL SIAJ LEGANTOJ
VERDA FAMILIO

La redaktoro elkore dankas ĉiujn legantojn, kiuj sendis al li okaze Kristnaskaj festotagoj kaj jarfino sian gratulon aŭ leteron. Ne estas eble al ĉiu danki aparte en mia nomo aŭ en nomo de la klubo. Ni almenaŭ promesas provizi vin dum la nova jaro 1992 per freŝaj, espereble favoraj informoj při tiaj okazaĵoj, kiaj estas antaŭkongreso en Prago, Universala kongreso en Vieno k.a. Kvankam ekonomio sufokas aktivecon de niaj kluboj, la „interna ideo“ de la iternacia lingvo helpos al ni transvivi la krizon.

TIUJ, KIUJ NE SUBTENIS NIN per ku ajn malgranda monsumo dum la lastaj jaroj, ne plu ricevos VF 2/92. Ni almetas poŝtpagilon kaj petas sendi minimuman sumon por registri vian adreson, pri kies ŝanĝo eventuale vi nepre informu nin (stratnomo, familia nomo). Via subteno estas bazo por nia agado. Kaso de nia klubo terure ŝrumpis, tamen por la jaro 1992 la eldonado de VF estas ankoraŭ certigita.

TI, KTEŘÍ NÁS NEPODPOŘILI jakoukoliv malou částkou v posledních letech, už nedostanou VF 2/92. Přikládáme složenku a prosíme poslat alespoň malou částku, abychom zaregistrovali Vaši adresu, o její změně (jméno ulice, příjmení) nás určitě informujte. Váš příspěvek je základem naší činnosti. Pokladna našeho klubu se hrozivě zcvrkla, přesto na rok 1992 vydávání Ferda Familio je ještě zajištěno.

## LA 76-A UNIVERSALA KONGRESO EN BERGEN-0 27.VII-3.VIII.

Universala kongreso de E-o estas ĉiujare la plej granda festo de nia movado. Bergeno estas belega norvegia urbo, situanta en sepmonta golfo, kiu kunvenis ĉijare 2295 gesamidanoj el 55 landoj – ili malgraŭ pesimismaj antaŭkalkuloj kuraĝis alfronti la nordiajn distancojn kaj prezojn. „Okcidenteŭropa“ tiaj distingoj komencas eksmodiĝi. Unu el surprizoj de Bergeno estis la kvanto da homoj el la pli orientaj partoj de Eŭropo, kiuj sukcesis venki ĉiujn praktikajn obstaklojn al partopreno. La orienta ĉeesto aparte bone videblis en la kulturaj programoj. Latvoj, rusoj, paro el Kazaĥio alportis ion freŝan kaj vivantan el siaj movadaj tradicioj. Tamen alveno al la UKo por multaj ne estis facila, nekonsiderante la prezojn, por kiuj multaj devis dum longa tempo ŝpari. Litova Esperanto-Asocio luis ŝipon „Akademiano Joffe“ por 72 pasaĝeroj kiu devis ankri en la bergena haveno kaj servi tie dum la kongresa semajno kiel komforta hotelo kaj restoracio. Eĉ UEA pruntedonis al Litova EA 13500 Usdolarojn por devigaj okcidentvaloraj pagoj rilataj al la vojaĝo. La ŝipo apartenis al soveta akademio de sciencoj kaj estis ekipita laŭ opinio de norvegaj oficialuloj per ĉiaj aparatoj kapablaj por spiona laboro. La malpermeso venis en Litovion nur post ekveturo de la ŝipo kaj post alveno ĝi devis 45 km distance de bergena haveno ankri kaj komencis spasma telefonado inter la ŝipo kaj kongresejo. Situacio aspektis senespere, kiam nur marde enŝaltiĝis bergena turisma buroo kaj ties energia direktoro Ola Hiis-Bergh, kiu mobilizis financan apogon de

Světový esperantský kongres je každoročním největším svátkem našeho hnutí. Bergan je překrásné norské město uložené v zátoku sedmi hor, kde se letos sešlo 2295 samideánů z 55 zemí – navzdory pesimistickým předběžným kalkulacím měli odvahu čelit severským vzdálenostem i cenám. „Západoevropský“ … taková označení začínají vycházet z mody. Jedním z překvapení v Bergenu bylo množství lidí z východnějších částí Evropy, kterým se podařilo všechny praktické zábrany účasti přemoci. Východní účast byla zvláště dobře viditelná v některých částech kulturního programu. Litvané, rusové a pár kazachů přinesli něco čerstvého a živoucího ze svých tradic hnutí. Přesto příjezd na UKo pro mnohé nebyl snadným, neuvažujíce o cenách, na které museli mnozí dlouho šetřit. Litevský esperantský svaz najmul loď „Akademik Joffe“ pro 72 pasažérů, který měl kotvit v bergenském přístavu a tam během kongresového týdne sloužit jako pohodlný hotel a restaurace. Dokonce UEA půjčil litevskému svazu 13500 US dolarů pro povinné platby v západní měně, týkající se cesty. Loď patřila sovětské akademii věd a byla vybavena podle mínění norských oficiálních činovníků všemi aparáty schopnými špionážní činnosti. Zákaz přišel do Litvy až po odjezdu a po příjezdu musela kotvit ve vzdálenosti 45 km od bergenského přístavu. Začalo křečové telefonování mezi lodí a kongresovou halou. Situace vypadala beznadějně, když teprve v úterý zaangažovala se bergenská cestovní kancelář a její energický ředitel Ola Hiis-Bergh, který zmobilizoval finanční podporu u některých velkých podniků a spolupráci městských instancí.

pluraj grandaj entreprenoj kaj de urbaj instancoj. La afero estis komplika, ĉar nur 32 el 72 estis esperantistoj, tamen la ministerio financis loĝigon, manĝojn kaj urban transporton por ĉiuj esperantistoj. Post fino de la kongreso ĉiuj 72 pasaĝeroj estis retransportitaj al „Akademiano Joffe“ por rekrozi al Klaipoda. Neagrabla estis konstato, ke nur kelkaj el la ŝipaj esperantistoj havis pagitan kongreskotizon, dum aliaj ne havis monon por tio. Ĉu KGB (soveta sekreta polico) volis eluzi nian kongreson por siaj celoj? Ĉu tiu demando gravas nun post la kongreso kaj post malfondo de tiu kaj tiastila KGB? Kiel eblis ekvojaĝi kun tiel granda grupo sen certeco, ke vojaĝdokumentoj estas la laŭordaj? Ĉiukaze aktuala moralaĵo tekstas: Oni ne eknavigu antaŭ ol havi permeson al bordiĝi, ĉar oni riskas resti surmare. Krome, „oni ekiru al niaj kongresoj nur kiam oni disponas almenaŭ pri minimuma monsumo necesa por dece pasigi la kongresan semajnon“ (citaĵo
de oficiala raporto pri la kongreso). Kvankam la aventuro de la ŝipo finiĝis bone en Bergeno, tiaj mirakloj kutime ne okazas. La norvega Ministerio pri eksteraj aferoj kaj la Urba Turisma Buroo meritas, almenaŭ flanke de UEA, specialan dankon por ilia kontribuo al la kontentiga solvo de plej granda problemo, kiun frontis la 76-an UK en Bergeno.

UK-oj havas tradiciajn solenajn erojn, kiuj ilin ornamas. Temas precipe pri solena inaŭguro kaj fermo de la kongreso. La organizantoj havis timon pri Grieghallen, kiel ejo por la inaŭguro, ĉar la salono havas nur 1500 lokoj kaj sur la scenejo eblis mezi nur 300 aliajn. Tamen tiu kvanto ĝuste sufiĉis kaj la spektaklo de bela plenplena halo doni al la kunveno jam dekomence festan optimisman etoson. Unue alparolis kongresanojn la prezidanto filologo John Wells. Poste sekvis alparolo de lokaj funkciuloj kaj salutoj de reprezentantoj de landaj E-asocioj. La kongresa programo estis tre

Byla to složitá záležitost, protože jen 32 ze 72 byli esperantisté, přesto ministerstvo zaplatilo ubytování, jídlo i městskou dopravu všem esperantistům. Po skončení kongresu všech 72 pasažérů bylo převezeno zpět na „Akademiano Joffe“, aby jeli zpět do Kajpedy. Nepříjemné bylo konstatování, že jen někteří z esperantistů měli zaplacený kongresový poplatek, zatím co jiní to neměli. Chtěla KGB (sovětská tajná policie) využít našeho kongresu pro své cíle? Je tato otázka důležitá nyní po skončení kongresu a po rozpuštění KGB toho stylu? Jak bylo možno vyjet s tak velkou skupinou bez jistoty, že cestovní doklady jsou v pořádku? V každém případě morální poučení zní: Nevyjíždět bez povolení příjezdu, nebo riskujeme zůstat na moři. Kromě toho: „vyrazme na naše kongresy jen tehdy, disponujeme aspoň minimálně s penězi, které nám dovolí slušně strávit kongresový týden“ (citace oficiální zprávy o kongresu). Ačkoliv lodní dobrodružství v Bergenu skončilo dobře, takové zázraky se obyčejně nedějí. Norské ministerstvo zahraničních věcí a Městská cestovní kancelář si zaslouží, aspoň ze strany UEA, zvláštní dík pro jejich příspěvek k úspěšnému rozřešení největšího problému, kterému čelil 76.UK v Bergenu.

UK-oj mají už tradiční slavnostní části, které je zdobí. Jde především o slavnostní zahájení a zakončení kongresu. Organizátoři měli obavy o Grieghallen jako prostor pro zahájení, protože salon má jen 1500 míst na podium bylo možno umístit jen 300 dalších. Přesto toto množství právě stačilo a jeviště zcela naplněné krásné haly dávalo už od počátku schůzi optimistickou náladu. První oslovil účastníky kongresu předseda filolog John Wells. Potom následovala oslovení místních činitelů a zdravice reprezentantů zemských E-o svazů. Kongresový program byl velmi bohatý a

riĉa kaj varia. Sekvis ĝeneralaj kunsidoj, fakaj kunvenoj, Cseh-metodaj kaj konversaciaj kursoj, internacia kongresa universitato, 15-a esperantologia konferenco, nacia kaj internacia vesperoj, kelkaj tre interesaj prelegoj je la kongresa temo „Nordio – ĉu modelo?“, prezento de la fama „Pupohejmo“ de Ibsen, rok-koncertoj de „Persone“ kaj „Amplifiki“, koncerto de la duopo Ĵumart kaj Nataŝa el Sovetunio, aŭkcio, tuttagaj ekskursoj, dum kiuj la kongresanoj havis okazon ĝui la belecon de kelkaj el la plej ĉarmaj norvegaj fjordoj. La vetero favoris la kongreson. Sep el ok kongresaj tagoj estis sunplenaj dank´ al varma golfa fluo, kiu konstante varmigas tiun parton de Norvegio, tiom, ke marbanado estas kutima. Iu orienta kongresano volis plibonigi sian malmolvalutan havaĵon per vendo de pluvombreloj. Malgaje li jam volis reveturigi hejmen, kiam dum disiro la lasta tago alportis savdonatan pluvon kaj la pluvombreloj estis tuj disvenditaj. Kiel ĉiam, la diskutoj kaj dum la ĝeneralaj kunsidoj, kaj dum la fakaj kunvenoj estis vivecaj, ĉar temis pri pluraj akre aktualaj, vivnecesaj problemoj de la movado kaj ankaŭ pri bremsoj, kiujn ni spertas en niaj klopodoj progresigi la internacian lingvon kvante kaj kvalite. Kompreneble estis diversaj opinioj, ofte eĉ kontraŭstaraj, sed reliefiĝis multaj komunaj pritaksoj kaj konkludoj. La ĉefa estas, ke 1990 ne estis unu simpla plua jaro, sed ĝi estis la plej nova kaj la plej promesoplena jaro de la lastaj jardekoj. Antaŭen paŝoj en Azio kaj Afriko, dua UK el Latinameriko, lanĉo de kulturaj kaj sciencaj iniciatoj, kreskanta membaro – jen kelkaj signoj de prospero. En 1990 daŭris intensa membro-varba kampanjo, kiu komenciĝis fine de 1989. La rezultoj de tiuj klopodoj pli klare aperos en la ciferoj de 1991, sed jam en 1990 enskribiĝis rekorda nombro de 7645 individuaj membroj

pestrý. Následovaly výborové schůze, odborné schůze, kursy Cseh-metody a konversační, mezinárodní kongresová universita, 15tá esperantologická konference, národní a mezinárodní večer, několik velmi zajímavých přednášek na kongresové téma „Je sever modelem?“, představení „Domu loutek“ Ibsena, rokové koncerty „Osobně“ a „Zesilovat“, koncert dvojice Ĵumart a Nataša ze Sov. svazu, aukce, celodenní výlety, během kterých účastníci kongresu měli příležitost užít krásy některých z nejkrásnějších norských fjordů. Sedm z osmi kongresových dní bylo plných slunce díky teplému golfskému proudu, který trvale prohřívá tuto část Norska natolik, že i koupání v moři je obvyklé. Nějaký účastník kongresu si chtěl přilepšit svůj majetek prodejem deštníků. Už je smutný chtěl odvézt domů, když během rozchodu na poslední den přišel spásonosný déšť a deštníky byly hned rozprodány. Jako vždy diskuze jak během generálních zasedání tak i během odborných schůzí byly čilé, protože se jednalo o mnohých ostře aktuálních, životně důležitých problémech hnutí a také o zábranách, které zjišťujeme při našich snahách pozvednout mezinárodní jazyk kvantitativně i kvalitativně. Samozřejmě byla různá mínění, často i protichůdná, ale zvýraznila se mnohá společná hodnocení i závěry. Hlavní je, že r.1990 nebyl jen jednoduše jen dalším rokem, ale byl nejnovějším a nejslibnějším rokem posledních desetiletí. Pokroky v Azii a Africe, druhý UK v latinské Americe, rozběh kulturních a vědeckých iniciativ, růst členské základny – to jsou znamení prosperity. V r. 1990 trvala intensivní náborová kampaň, která začala koncem r.1989. Výsledky těchto snah objeví se v číslech roku 1991, avšak už v r.1990 se zapsal rekordní počet individuálních 7645 členů (vzrůst

(kresko de 290 kompare kun 1989). Multaj traktadoj estis dediĉitaj al la profundaj ŝanĝoj en Eŭropo, kiuj kaŭzis eksterordinarajn mafacilaĵojn por orienteŭropaj landaj asocioj. Pro tio lastatempe estraro de UEA dediĉas apartan atenton kaj skizis principojn de sia taktiko. Ĝi celas stimuli spertinterŝanĝojn kaj kunlaboron inter asocioj kun similaj problemoj kaj celoj. Rezulte jam fortiĝas la tendenco al regiona kunlaboro. Jam en kadroj de la kongreso okazis ankaŭ interesa renkontiĝo de kongresanoj el balkanaj landoj. En estrara raporto tamen estis emfazite, ke la evoluo kaj praktiko en ekssocialismaj landoj tute ne estas unueca. Kvankam ĉiuj frontas ekonomiajn problemojn, aliaj faktoroj tre diversas. La plej dramaj ŝanĝoj lastatempe estis: la apero de nova landa asocio en Rumanio, kiu tuj ricevis grandskalan praktikan kaj moralan subtenon de alilandaj esperantistoj, kaj malapero de tiu en GDR, kiu ekde 1991 ne plu membras en UEA kaj kunfandiĝis kun Germana asocio. Sovetia movado vigle plu evoluas kun malmulta kunordigo je tutlanda nivelo. En UEA nun membras kvin landaj asocioj el Sovetunio, kvar unuopaj respublikoj kaj unu (Sovetrespublika Esperantista unio) kun nedifinita teritorio. La komitato konstatis, ke post kelkaj malfacilaj jaroj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) denove havas stabilan estraron, travideblan financon kaj bazon por pluevoluigi la agadon – precipe en sia fortika reto de interpersonaj kontaktoj. Alia ĝojinda fakto estas plibonigo de 56 fakaj organizaĵoj, el kiuj kelkaj grupigas homojn laŭ mondkoncepto. Denove la plej frapa evoluo pri la scienca uzo de Eo estis konstatita ĉe Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) San Marino. Fondiĝis la unuaj landaj filioj kun rajto organizi studsesiojn kaj kursojn.

o 290 proti r.1989). Mnoho jednání bylo věnováno hlubokým změnám v Evropě, které způsobily mimořádné potíže východoevropským svazům. Proto v posledním čase předsednictvo UEA věnuje zvláštní pozornost a nastínilo principy své taktiky. Má za cíl podporovat výměnu zkušeností a spolupráci mezi svazy s podobnými problémy a cíly. Výsledkem toho je, že už je tendence ke krajové spolupráci. Ve zprávě předsednictva však bylo zdůrazněno, že vývoj a praktiky v bývalých socialistických zemích není jednotný. Ačkoliv všichni čelí ekonomickým problémům, jiné faktory se velmi liší. Nejdramatičtější změny poslední byly: zrod nového zemského svazu v Rumunsku, který hned obdržel praktickou i morální podporu esperantistů jiných zemí, a zánik svazu v DDR, který od r.1991 už není členem UEA a spojil se s Německým esperantským svazem. Sovětské hnutí se čile rozvíjí jen s malou centrální celostátní koordinací. V UEA jsou členy nyní 5 zemských organizací v Sovětském svazu a jeden (Esperantský spojený svaz) s nedefinovaným územním ohraničením. Výbor konstatoval, že po několika nesnadných letech Celosvětový svaz esperantské mládeže (TEJO) má stabilní předsednictvo, přehledné finance a základ pro další rozvoj činnosti – především ve své silné síti meziosobních kontaktů. Jiným potěšujícím faktem je zlepšení 56 odborných svazů, z nichž některé shromažďují lidi podle světonázoru. Znovu nejnápadnější rozvoj vědeckého užití Esperanta byl konstatován u Mezinárodní Akademie Věd (AIS) San Marino. Byly založeny jednotlivé zemské pobočky s právem organizovat studijní zasedání a kursy.

Dum la kongreso estis ankaŭ fondita nova internacia socio „Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo“ (Mallonge Monda Kunagado) kiu celas integri agadon de UEA kaj UNESCO kaj ĝia propaganda organo estas „Monda forumo“. Pri tiu kaj aliaj okazaĵoj de UKo ni ankoraŭ referos.

Během kongresu byla také založena nová mezinárodní společnost „Světová spolupráce pro výchovu, vědu a kulturu (zkráceně Světová spolupráce), která chce integrovat činnost UEA a UNESCO a jejím orgánem je „Světové forum“. O ní a jiných událostech UKo ještě preferujeme.

<u>KONFERENCO DE ĈEA</u> okazis la 22an-24an de novembro 1991 en Čes.Třebová. Sekretariejo pro financmanko limigis spacon je duono, restis nur sekretario kaj parte pagita kontistino. Kaso reduktiĝis ĝis 500 Kčs, helpon alportis sukcesa internacia fervojista kongreso en Olomouc, kiu ebligis pluan agadon de la asocio. Krom ĉiujara SET en Lanĉov estontjare okazos Antaŭkongreso en Prago kaj katolika tendaro en Sebranice, ĉijare sukcesa. La Ukon en Vieno oni povos ĉiutage viziti aŭtobuse el Lanĉov (2 manĝojn kunprenitajn, tranokton en la tendaro pagos la partoprenanto 2500 Kčs + oni devas pagi kongresan kotizon 1700 Kčs) aŭ el Bratislava (sen manĝoj, nur ĉiutaga aŭtobusa veturado). Germane kaj esperante parolantoj povas aliĝi ĉe la asocio por helpi dum UKo en Vieno. - 1993 okazos pedagogia kongreso ILEI en Bratislava kaj Internacia konferenco de ICEM – dana pedagogia Freinet instituto en Pardubice. - INFOSERVO estas nun gvidata private de Drino Pavla Dvořáková. Ĝi enhavas vendadon de libroj kaj gazetoj. - AIS (Akademio Internacia de San Marino) havos sian filion ankaŭ ĉe Universitato de Karlo en Prago. Oni povas doktoriĝi en Eo aŭ G, A, F kaj I lingvoj. Informoj ĉe la sekretario Dro Skalický ĉe prof.Lánský, didakte-pedagogia fakultato, Prago 2, Retigové Nro 2. - INTERHELPO estas memstara kooperativo gvidata de Zdeněk Křimský, pk 44, 15000 Prago 5. Ĝi proponas librovendadon, eskporton kaj importon, vojaĝadon per Monda Turismo kaj slovakia EA, lua ĉambrojn en sia pensiono en Prago, eldonos ĉeĥlingvan infanan literaturon -komiks- „Okazaĵoj de Puntja“; TILIO estas vojaĝoficejo de ĈES – ĝi organizos la antaŭkongreson kun 5taga programo kaj ĉiutaga aŭtobusa veturado, interkonatiĝa vespero ktp – partoprenu almenaŭ dum unu tago. Detaloj ĉe ĈEA. - TEJO preparas skitago en Horní Polubný 30.I.-2.II.-90Kčs kaj ekskurson al Francio (28.VIII.-4.IX.1992 2800Kčs – aliĝu tuj).

<u>KONFERENCE ČES</u> byla uspořádána 22.-24.listopadu 1991 v České Třebové. Sekretariát pro nedostatek financí omezil prostor na polovinu, zůstal jen sekretář a účetní s část.úvazekm. Pokladna se zredukovala až na 500 Kčs v červenci, pomoc přinesl úspěch mezinárodního železničářského sjezdu v Olomouci, který umožnil další činnost svazu. Kromě každoročního táboru v Lančově bude uspořádán Předkongres v Praze a katolický tábor v Sebranicích, letos úspěšný. UK ve Vídni bude možno každodenně navštěvovat autobusem z Lančova (2 jídla s sebou, přenocování v táboře bude účastník platit 2500 Kčs + povinnost zaplatit kongresový poplatek 1700 Kčs) nebo z Bratislavy (bez jídel, jen každodenní doprava autobusem). Německy a esperantsky bezvadně mluvící se mohou přihlásit na svazu pomoci během UKo ve Vídni. - V r.1993 bude uspořádán sjezd ILEI pedagogický v Bratislavě a Mezinárodní konference ICEM, dánského pedagogického Freinet-institutu v Pardubicích. - INFO-SERVO je nyní veden Dr Pavlou Dvořákovou. Obsahuje prodej knih a časopisů. - AIS (Akademio Internacia de San Marino) bude mít svoji pobočku také při Karlově universitě v Praze. Titul doktora je možno získat v oboru Eo, G, A, F a I-jazyka. Informace u sekretáře Dr Skalický u prof. Lánského, didakticko-pedagogická fakulta, Praha 2, Retigové č.2. - INTERHELPO je samostatné družstvo vedeno Zdeňkem Křimským, ps 44, 1500 Praha 5. Nabízí prodej knih, eksport i import, cestování prostřednictvím Monda Turismo a Slovenského ES, pronajímá pokoje ve svém pensionu v Praze, vydává v češtině dětskou literaturu -komiks- „Punťovy příhody“; TILIO je cest.kancelář svazu – organizuje Předkongres (19.-25.VII.) s cestovním autobusovým programem v Praze, seznamovacím večerem atd. - účastněte se aspoň jedním dnem. Podrobnosti u ČES. - Mládežníci připravují lyžovačku v Horním Polubném 30.I.-2.II. - 90 Kčs a výlet do Francie (28.VIII.-4.IX. 1992 2800 Kčs – přihlaste se ihned!)

Sekcio de handikapuloj de ĈEA organizas Mondan kongreson 1992 en Frant. Lázně pritempe. Petu informojn.
Sekce invalidů při ČEA organizuje na jaře světový kongres ve Frant Lázních. Vyžádejte si informace!

Esperantistoj el Železný Brod vizitis sian estron en lia kabano en Velké Hamry kun kun gesamideanoj el Jablonec, Turnov, Jaroměř kaj ankaŭ la verkisto Vladimír Mikolášek el Ž. Brod. Entute 15 personoj ĝuis agrablan amikan renkontiĝon.

IIV-a Internacia turisma renkontiĝo de esperantistoj en Ercmontero okazis dum lasta septembra semajno en Nové Hamry, proksime de Nejdek. Ĉirkaŭ 40 gesamideanoj ĝuis familian etoson kaj agrablan medion, ekskursis sur prosimaj montoj, vizitis banurbon Karlovy Vary kaj minejan ekspozicion en Johann-Georgen-Stadt. Vespere partoprenintoj el PRG, Danlando kaj ĈSFR amuziĝis, rigardis diapozitivojn, programon de folklora grupo Dyleň. Dankon al E-klubo Karlovy Vary, la organizinto. (M.Severa, Česká Lípa).

KORESPONDI DEZIRAS: (Mallongiloj-zkratky: bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝas; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; po=poŝtmarkoj; tm=tutmonda.
KORESPONDA SERVO MONDSKALA ekde kelkaj monatoj havas novan gvidanton: F.X.Gilbert, Vert Coteau, Longeville en Barrois, F-55000 Bar-le-Duc, Francio
Petu informojn pri koresponda servo „Al vi" pk 404, 232004 Vilnius, Litovio.
-Grupo „Lietzensee", Herbartstr.25, D-1000 Berlin 19 festas 10-jaran jubileon kaj akcekptas bondezirojn.
Esperanto-turistoj estas ĉiam bonvenaj ĉe Narasimha Rao P., „Pillarisetty house" Chammanagiripeta, Machilipantan (A.P.), 521001 Hindujo.
Urba lernejo petas bk por siaj lernantoj: I.B.A., Barŝo Rio Branco 93, 1-0 Andar, BR-35100 Gov. Valadares, Minas, Brazilo
Martha Soonentah, 84jj, Pfannenstiel 32, D-W 7980 Ravensburg dezi ricevi bk.
Ewa Klis, 17j liceanino, ul.Zamenhofa 29a/14, PL 42-300 Myszkow, voj. Czestochowa, d kor tm pri m, ekologio, parapsikologio kaj jogo.
Jolanta Kontrimaite, Geguzes, I-osios 30-2 SU 235700 Kretinga, Litovio, juna esperantistino d kor tm pri m, turismo, iŝ bk, aktorfotojn.
Korespondamikojn inter inĝenieroj, ekonomiistoj, juristoj, peras Vasile Albu str Eroiler 9, R-2400 Sibiu Rumanio.
Itala Esperantista junularo informos vin pri siaj aktivecoj. Demandojn sendu al Daniela Costa, Via Foscolo 27, I-10126 Torino.
Handikapuloj interkonatiĝos kun aliaj samsortantoj dum Monda kongreso de E-Handikapuloj 18-25.VII.92 en Františkovy Lázně, fama monda banejloko. Informoj: Asocio de E-handikapuloj, PK 63, CS-27480 Slaný
Pri kontaktoj kun brazila E-junularo petu ĉe Tuka/BEJO-prezidanto, Caixa postel 55030, BR-04799-Sâo Paulo, Brazilo.
Roger Destabelle, instruisto de Esperanto, Avenue Brunard 2, B-4840 Fleurus Belgio.

Fraŭlino Chan Scok Wai, 1008 Jalan Selesa 4, Happy Garden, 58200 Kuala Lumpur, Malajzio – itŝ bultenojn, lernolibrojn por kursanoj de MEA.
Kristophio Alves, PK 796-HR-57001/AL pm, tk, ekologiaj afiŝoj.
Kuzmenko Larisa, SU 622013 Sverdlovskaja obl. u.N.Tegil, Kunsvinskaja str.25, „A“ serĉas klubkontaktojn, itŝ pm, propagando de Eo, turismo.
Stanislav Fischer, Bulgarska 8/8, PL64-100, Leszno, itŝ filatelaĵojn.
Krylova Irina Aleksandrovna, 15j, Statgbyninku 4-54, Klaipeda 235815 Litovio, SU tm ĉt.
Esperantista Rondo Amika en Nové Zámky: organizas unutagajn renkontiĝojn kun instrua programo. Korespondadreso prof.E.Geleta, VOSR 2/11 ČS Nové Zámky. Venu kun viaj amikoj!

LASTMOMENTE: Akademianino Eli Urbanová, Veleslavínská 47, 16200 Praha 6 festas la okan de februaro sian jubileon. Modesta poetino verkas literajn poemojn, por kiuj ŝi plurfoje ricevis premiojn ĉe belartaj konkursoj de Universalaj kongresoj. Ŝi plene meritas elkoran gratulon de nia bulteno kaj de la tuta esperantisaro. En la estonta numero ni alportos nian malgreandan bukedon.
Forpasis František Sedláček el Hartíkovice en la aĝo de 82 jaroj post mallonga malsano. Li estis longjara kunorganizan to de SET en Lanĉov kaj multaj eĉ ne povas imagi la tendaron sen lia persono. Kvankam lia vivo finiĝis, lia verko daŭras kaj li estos daŭre rememorata.
Raymond Wylleman, A.Vermeylenstraat, B-8400 Oostende, instruisto de Eo, ĉt.
Hemere Verfille, Koning Albertstraat 36, B-8160 Diksmude, instruisto de Eo
Esperantista klubo „Verda Stelo“, BP 06-1855 Cotonou, BENIN, Afriko tm ĉt
Francis Akpa, B 434, Cotonou, BENIN, studento , tm pri komerco
Madrigo Monteiro Jacob, Rua Sancta Katarina 1042 apto 101, BR 30170 Helo Horizonte – MG, BRAZIL, 18j
Alfred Petrov, Casilla 1728, Cochabamba, BOLIVIA, ekologo, d kor pri gastigado, ekologio, mienralogio.
Oŭropeta Esperanto Grupo, Caixa postal 42, BR-36400 Oŭro-Preto BRAZIl d kor pri lernado de Esperanto.
Gordon Anderson, Abbey Craig Park, Causewayhead Stirling, Scotlando, U.K. FK9 5LG, 18j

xmxmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
CS 29501 Mnichovo Hradiště